

Rainer Maria Rilke,
Herbst

Die Blätter fallen, fallen wie von
weit,
als welkten in den Himmeln ferne
Gärten;
sie fallen mit verneinender
Gebärde.
Und in den Nächten fällt die schwe-
re Erde
aus allen Sternen in die Einsam-
keit.

Wir alle fallen. Diese Hand da fällt.
Und sieh dir andre an: es ist in al-
len.
Und doch ist Einer, welcher dieses
Fallen
unendlich sanft in seinen Händen
hält.

*Verkinto de tiu ĉi Germana poemo
estas RAINER MARIA RILKE (Rajnero
Mario Rilko, *1875-12-04 – †1926-12-
29).*

Arg-773-1549 (2013-01-16 22:31:11)

Rainer Maria Rilke,
Aŭtuno

*tradukita de Manfred
Retzlaff*

Folioj kvazaŭ el la malprok-
sim'
- ĉu velkas enĉiele jen
ĝardenoj? -
faladas kun gestad' neanta;
la peza Tero estas subiĝanta
en la solecon el stelar-
senlim'.

Ne estas en la mondo viv'
sen fin'.
Ja falas ĉiu mano. Tamen
sciu,
ke regas super ĉio Iu, kiu
en Sia man' mildege tenas
nin.

*Traduko de la Germana poe-
mo "Herbst" de RAINER MA-
RIA RILKE (Rajnero Mario
Rilko, *1875-12-04 – †1926-12-
29) en Esperanton de MAN-
FRED RETZLAFF (*1938-11-
04) en 1996-09-26.*

*MR-287-1 / Arg-773-1550
(2014-11-06 13:16:30)*

Rainer Maria Rilke,
Aŭtuno

tradukita de Cezar

Folioj falas iel el la for',
jen kvazaŭ velkus en ĉiel'
ĝardenoj.
Faladas ili kun neanta gesto.
Kaj nokte sinkas peza ter' sen
resto
el ĉiuj steloj al solec' en hor'.

Ni ĉiuj falas. Jen ĉi man' dum
fal'.
Aliajn vidu, samas ja ĉe ĉiu.
Kaj tamen estas iu, tenas tiu
tenere ĉion softe dum la fal'.

*Traduko de la Germana poe-
mo "Herbst" de RAINER MA-
RIA RILKE (Rajnero Mario Ril-
ko, *1875-12-04 – †1926-12-29)
en Esperanton de CEZAR (ci-
vila nomo: Hans-Georg Kaiser,
1954-05-21).

*Arg-773-2256 (2015-01-22
12:16:31)*

*Tiu ĉi poem-traduko troviĝas en
[http://www.ipernity.com/
blog/cezar/605953](http://www.ipernity.com/blog/cezar/605953).*